

Kelkaj nocioj pri la kebekia lingvo

Sylvain Auclair

À nos lecteurs québécois: j'explique régulièrement ici en français des points de grammaire ou de vocabulaire de l'espéranto. Cette fois-ci, à l'occasion de la tenue à Montréal du Congrès panaméricain d'espéranto, je prends le chemin inverse, et explique en espéranto à nos visiteurs quelques notions concernant la français québécois.

Tre fama kebekia leĝo asertas en sia unua artikolo ke la franca lingvo estas la oficiala lingvo de Kebekio. Tamen, mi en mia unua UK krokodilis — mi petas pardonon — kun franca samideano, antaŭ alilingva aŭskultantino, kiu ne nur ne komprenis nin, sed apenaŭ povis kredi, ke ni komprenis unu la alian!

Kebekianoj ĉesis esti parto de la franca imperio jam ĉ. 1760. De tiam, dum pli ol jarcento, sed por la plimulto preskaŭ du jarcentoj, ni apenaŭ havis kontaktojn kun aliaj franclingvanoj. Kaj post nia malvenko kontraŭ brita armeo foriris plej granda parto de nia elito; eĉ paroĥaj pastroj estis malmultaj. En similaj cirkonstancoj, nederlandaj kamparanoj en Sud-Afriko evolui-

gis nova lingvon, la afrikansa. Ĉe ni, kvankam ni plu nomas nian lingvon la franca, iuj povus aserti ke temas, almenaŭ ĉe la parola nivelo, pri nova lingvo.

La plej supraĵa nivelo de lingvo estas la vorttrezero. Kompare kun la franca, la kebekian karakterizas du ĉefaj trajtoj: unue la konservo de malnovaj vortoj, kiuj malaperis el la norma franca lingvo (sed foje estas plu uzataj en francaj regionoj, ĉefe en tiuj regionoj de kiuj venis niaj prapatroj), kaj, due, la masiva enkonduko de anglaj terminoj.

Ekzemploj de la unua tipo: *achaler*: ĝeni; *bec*: kiso; *barguigner* aŭ *bar-gainer*, negoci; *maganer*: damaĝi; *(dé)barrer*: (mal)ŝlosi, *brunante*: vesperigi; *abrier*: kovri (en lito).

Estas notinde, ke vorton kiel *barguigner* oni foje sentas kiel anglismon, dum fakte la angla lingvo pruntis ĝin el la franca antaŭ longe... Same por *malle*: poŝto, kiu ne venas el la angla *mail*.

Ekzemplo de anglismoj : estas tre malnovaj anglismoj, kiel *enfrouaper*: trompi. Ĝi venas el

la esprimo *in fur wrapped*, laŭ la rakonto ke iuj klopodis vendi ĉifaĵojn kovritan de feloj kiel nuraĵn felojn, en la epoko, kiam kolekto kaj vendo de feloj estis grava monrimedo.

Krome, vi devas kompreni, ke ĉiuj teĥnikaj novaĵoj de la 19^a kaj 20^a jarcentoj venis al ni kun sia angla nomo. Dum la lastaj jardekoj, ni forte reagis kontraŭ tiuj pruntoj, ĝis la punkto, ke ni sentas ke la francoj nun tro facile akceptas anglajn vortojn. Ekzemple, por retroŝto ni diras *courriel*, dum francoj diras *mail* aŭ *e-mail*. Sed restas multaj anglaj vortoj en nia ĉiutaga parolado.

Cetere, ni ankaŭ pruntis vortojn el diversaj indianaj lingvoj. Ni diras *original* por alko (francoj: *élan*), *atoka* por oksikoko (francoj: *can-neberge*), *ouananiche* por iu loka fiŝo (fakte ĝi estas ia salmo, kiu pasigas sian tutan vivon en lago). Kaj ni kreis kelkajn vortojn: *poudrerie* por neĝblovado, *banc de neige* por neĝamaso, k.a. Kaj francoj trovas tre amuze, ke ni uzas la vorton *char* (ĉaro, tanko) por aŭto.

(sekvo al la paĝo 3...)

Le 7^e Congrès d'espéranto des Amériques

Boris-Antoine Legault

Le septième Congrès d'espéranto des Amériques aura lieu à l'UQAM (Montréal) du 11 au 18 juillet et aura pour thème : *Écosystèmes, Langues, Cultures : Diversité pour le développement durable des Amériques.*

Il s'agit d'une occasion unique pour les espérantophones et amis de l'espéranto du Québec, combinant la plus importante rencontre d'espéranto de la décennie en Amérique du Nord à un thème d'une grande importance pour l'avenir de nos sociétés. Déjà plus de 150 personnes d'une dizaine de pays ont confirmé leur participation. Le congrès accueillera notamment Maritza Gutiérrez González (Cuba), rédactrice en chef de l'émission de Radio Havane en espéranto, José Antonio Vergara (Chili), responsable de l'avancement des

sciences à l'Association mondiale d'espéranto, Rubén Ortiz Hernández (Guatemala), directeur de l'entreprise d'éco-tourisme autochtone AgroETour, et JoMo (France), chanteur espérantophone bien connu (une liste plus complète des invités spéciaux se trouve sur le site : www.take7.ca/gastoj.html)

En plus de plusieurs présentations, débats et ateliers touchant de près ou de loin le thème du congrès, plusieurs visites guidées, trois soirées spectacles et un banquet (optionnel) sont également au programme. Pour les débutants, des ateliers d'initiation à l'espéranto seront offerts tout au long du congrès, sans frais supplémentaires.

Le coût d'inscription pour l'ensemble du congrès est de 140\$.

La participation aux activités de jour pour les étudiant-e-s et employé-e-s de l'UQAM est gratuite. La participation au banquet est optionnelle, et requiert un déboursement supplémentaire de 30\$. Notez qu'un rabais peut être accordé pour les personnes qui ne pourront pas assister à la totalité de l'événement et aux étudiant-e-s ou personnes à faible revenu. Inscrivez-vous directement sur le site www.take7.ca ou communiquez avec nous pour plus d'informations: info@take7.ca

Si vous souhaitez aider à l'organisation du congrès, veuillez communiquer directement avec nous à info@take7.ca



**Société québécoise d'espéranto
Esperanto-Societo Kebekia**

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 290 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Rédaction : Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE : Boris-Antoine Legault (président), Martin Benoit (vice-président), Jérôme Frédéric Bouchard (secrétaire), Sylvain Auclair (trésorier) et Normand Fleury (conseiller) .

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : Marte, Junie, Septembro kaj Decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo : kebk-d. Redaktado: Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK : Boris-Antoine Legault (prezidanto), Martin Benoit (vicprezidanto), Jérôme Frédéric Bouchard (sekretario), Sylvain Auclair (kasisto) kaj Normand Fleury (konsilanto).

Échéance pour le prochain numéro / *Limdato por la venonta eldono* : 2008.09.01

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 • informo@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

Kelkaj nocioj pri la kebekia lingvo (sekvo)

Sylvain Auclair

(sekvo de la paĝo 1)

Malnovismoj ankaŭ ekzistas ĉe prononco. En iuj cirkonstancoj, ni diras *frette* anstataŭ *froid* (multaj francaj vortoj kun la literduo *oi* evoluis al *ai*, kun prononco /ɛ/); ni sentas ĝin pli malvarma ol *froid*. Iuj eĉ prononcas ĉiujn *oi* kiel /we/ anstataŭ /wa/. Nia vokalsistemo estas pli malsimpla ol tiuj de la francoj, kun longaj diftongoj. Ni distingas *patte* kaj *pâte* /pat/, /pawt/, *brun* kaj *brin*, *coté* kaj *côté* /kote/, /ko:te/. Ni ankaŭ distingas sisteme alternas /l/, /ʎ/ kaj /y/ kun /i:/, /u:/ kaj /y:/ en akcentitaj vokaloj (la longaj ekzistas antaŭ *v*, *z*, kaj /ʒ/).

Aparte karakteriza estas la ĝenerala afrikatigo de *t* kaj *d* al *c* kaj *dz* antaŭ *i* kaj /y/. Vi ofte aŭdos kebekiajn esperantistojn tiel erari, kaj diri *ciu* anstataŭ *tiu*... (Alia rekoniga trajto estas plilongigo de la finaĵo -as al -aŭs... Jen vi scias.)

Gramatike, ni ankaŭ konservis malnovismojn. Ekzemple, ni malaperigas la akuzativan personan pronomon ĉe dativa persona pronomo: Mi donis ĝin al li: *Je lui ai donné*. Fakte, parole, malaperas la *L*: *J'y ai donné*. Tio estas ĝenerala, sed ankaŭ foje aŭdebla en Francio.

Pli specifa estas la kunigo de la prepozicioj *dans* kaj *sur* kun artikolo. En la norma franca, pre-

pozicioj *à* kaj *de* tiel kuniĝas al artikolo: *au*, *aux*, *du*, *des*. Ni pluigis la aferon: *dans la* -> /dã;/; *dans les*: *dins* /dẽ/; *sur la*: /sa:/; *sur les*: /se:/. Oni ofte konsideras tiun uzon kiel eraron, ĉefe la kunigon de *dans la*, en kiu oni sentas ke oni nur forgesas la artikolon.

Same povas kuniĝi prepozicio kun artikolo kaj substantivo en kelkaj esprimoj: *dinscalier* (en la ŝtuparo), *dinglise* (en la preĝejo), *électricité* (elektre). Kompreneble, neniu jam skribas tiel: oni uzas la longajn formojn: *dans l'escalier*, *dans l'église*, *à l'électricité*...

Fine. Oni nun multe diskutas pri la religia heredaĵo de nia socio. Kebekio longe estis katoligea, sed nun havas inter la plej malgrandaj nombroj da geedziĝoj kaj da naskoj en la mondo. Sed se iu martelas al si la fingron, aŭ vidas aŭton fari danĝeron agon, vi tuj aŭdos parton de tiu heredaĵo. Por esprimi koleron, ni ĝenerale uzas vortojn kiuj reprezentas Dion, la Kriston aŭ divesaj preĝejaj objektoj. Multaj kebekianoj dum vintre ferias al Meksikio, kaj iuj meksikanoj moknomis nin *los tabarnacos*...

Esperanto @ Sociaj Retejoj

Boris-Antoine Legault

Lastatempe aperis en interreta mondo pluraj tiel nomataj « sociaj retejoj », ĉe kiuj uzantoj povas krei propran mempriskribon, trovi novajn geamikojn kaj partopreni en retaj komunumoj.

www.facebook.com

Facebook estas nuntempe la 6^e plej populara retejo en la mondo (aparte populara en Norda Ameriko), kun pli ol 80 milionoj da uzantoj. Kaj kiel fartas Esperanto-komunumoj ene de Facebook? La plej populara Esperanto-grupo ĉe Facebook havas pli ol 1400 membrojn. Aliaj grupoj estas malpli grandaj. Ekzemple, Esperanto - Canada havas 14 membrojn. Laŭ mi, tiuj grupoj ĉefe utilas al komencantoj aŭ interesatoj vidi ke ja ili ne estas solaj, kaj eventuale povas trovi novajn amikojn / kontaktulojn por interŝanĝi. Krom retan amikumadon, Facebook ankaŭ faciligas anoncon de eventoj kaj reklamon pri ili : jes ja! Ĝis nun 21 Facebook-anoj « konfirmis » sian partoprenon en venonta Tutamerika Kongreso de Esperanto...

Aniĝu al « Esperanto-Societo Kebekia » ĉe Facebook (vi devas unue krei konton se vi ne havas) :

www.facebook.com/group.php?gid=7934930994

(sekvo al la paĝo 4...)

Esperanto @ Sociaj Retejoj (sekvo)

Boris-Antoine Legault

(sekvo de la paĝo 3)

www.ipernity.com

Iperernity estas alia socia retejo, kiu ebligas ĝiajn uzantojn skribi blogojn kaj publikigi bildojn kaj aliajn dokumentojn. Ekzistas Esperanto-komunumo tie kun pli ol 1000 membroj. Iperernity estas plurlingva retejo, populara en Eŭropo sed ankoraŭ ne tre konata ĉi-tie.

www.orkut.com

Socia retejo tre simila al

www.facebook.com sed populara ĉefe en Brazilo (pli ol 50% el ĝiaj membroj troviĝas en tiu lando). Ankaŭ ĉe orkut ekzistas Esperanto-grupoj. Do se vi volas amikiĝi kun Brazilaj Esperantistoj, jen perfekte ejo por vi!

www.amikumu.com

TutEsperanta, ambicia projekto de retkomunumo por Esperantistoj. Kiam tiu retejo stariĝis antaŭ unu jaro, la espero estis grandaj, sed nuntempe ĝi ĉefe servas kiel listo de amikumemaj Esperantistoj el la tuta

mondo. Ĝi ja plu estas bona loko por trovi babil-amikojn.

Krom la supre menciitaj, troviĝas pluraj aliaj sociaj retejoj interesaj por Esperantistoj kaj amikoj de Esperanto. Vidu liston ĉe : http://esperanto.wikia.com/wiki/Sociaj_retejoj

Les soirées durant le Congrès d'espéranto des Amériques à Montréal en juillet

Normand Fleury

Même si vous ne pouvez pas participer au Congrès d'espéranto des Amériques parce que, par exemple, vous travaillez lors de cette semaine, nous vous invitons à venir sentir le mouvement espérantistes lors des programmes de soirée.

La soirée d'ouverture du vendredi sera suivi d'une soirée québécoise le samedi et d'un grand banquet la dimanche soir avec un concert multilingue de JoMo (directement venu de France).

Au programme du lundi soir, un panorama des cultures latines des Amériques, de Cuba et du Mexique en passant par le Pérou et l'Argentine.

Mardi c'est la soirée espérantiste avec trois artistes, Benjamin des États-Unis, Julian de Cuba et finalement JoMo, avec un répertoire en espéranto.

Montréal la nuit suivra le mercredi avec une sortie en ville pour prendre part au festival Juste pour rire, ou bien déambuler dans le

Vieux ou sur le Mont-Royal.

La soirée finale du jeudi soir aura lieu au Bistro Sanguinet du pavillon DeSève de l'UQÀM. Bienvenue dans la culture espérantophone et au plaisir de vous accueillir.

www.take7.ca

Vesperoj dum la 7^a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto en Montrealo (TAKE 7)

*De la 11^a ĝis la 18^a de Julio 2008 en UQÀM
kaj Cégep du Vieux-Montréal*

Normand Fleury

Eble vi ne ankoraŭ aliĝis al la kongreso ĉar vi devos labori dum la kongresa semajno aŭ simple ne sciis ĉu vere io interesa okazos dum la kongreso. Nu, almenaŭ venu ĝui la vesperojn kun la kongresanoj. Mi prezentas al vi la vesperojn kaj nepre ne maltrafu la okazon veni sperti Esperantion en Montrealo! Ni sincere invitas vin. Bonvenon!

La bonveniga vespero okazos dum la vendredo en Bistro Sanguinet ĉe UQÀM, konstruaĵo J.-A.-De-Sève, 320, rue Sainte-Catherine Est (metroo Berri-UQÀM) Post la bonvenigaj vortoj estos prezento de biodanco (danco pri la Tero) kaj interkonatigaj ludoj.

La dua vespero estos la Kebekia vespero. Ĝi okazos en Cégep du Vieux-Montréal kaj enhavos muzikon, rakontadon, koncerton de la indiĝena grupo *Anishnabe* kaj folkloran prezenton de la grupo *Les Danceux* kun partopreno de la ĉeestantoj. Eblos trinki picean bieron kaj aceraĵon.

Dimanĉe okazos la bankeda vespero kun bufedeca manĝo. Mi mendis manĝaĵon de la manĝoservo *Crudessence* kiu specialiĝas en vegetaraj ekologiaj manĝoj kun

ingrediencaj en Kebekio. Poste estos aŭkcio de raraj Esperantaĵoj profite al la Amerika Fondaĵo kaj fine danciga koncerto multlingva de la fama vigla kantisto *JoMo* el Francio.

Sekvos latina vespero, kiu prezentos panoramon de la diversaj latinamerikaj kulturoj. Vi povos spekti indiĝenan dancon el Peruo, afrikecan muzikon kiu influis SudAmerikan kulturon, tangon el Argentino, Kubecan kaj Meksikecan muzikojn kaj fine panoramon de la SudAmerikaj muzikoj kun Reno Pichardo.

Marde estos la Esperanta vespero kun koncerto de tri Esperantistaj artistoj: Benĉjo el Usono, Julian Hernandez el Kubo kaj JoMo el Francio.

Noktumi Montreale estos la temo de la merkreda vespero. La kongresanoj disiros en grupetoj por sperti la noktan vivon en la malnova urbo aŭ la ridfestivalon aŭ la monton, ktp...

Fine okazos la amikeca vespero, denove en Bistro Sanguinet en UQÀM. Jen la lasta ebleco bierumi kun Esperantistoj kaj ĝui Esperantion.

Morto de Paul Ronald

Jérôme Frédéric Bouchard

Mi havas la malagrablan taskon informi vin ke Paŭlo Ronald (Paul Ronald) mortis la 17^{an} de majo 2008, pro kancero de haŭto. Zdravka Metz kadre de lia partoprenado en la projekto Viv'protokolo intervjuis sinjoron Ronald en 1996. Mi prezentas sube parton de la viv'protokolo de Paŭlo verkita per Zdravka. En tiu teksto, la pronomo « Mi » referencas al Paŭlo...

Mi naskiĝis en juddevena familio kiu ne praktikis multe religion, tamen mi kiel 13-jara knabo partoprenis barmicvan ceremonion. Tiam nia familio jam vivis en Suda Afriko en Capetown. Mia patro estis kuracisto kaj la patrino socia laboristino. Ili frue komprenis la timigan hitleran movadon kiu evoluadis en Germanio en la tridekaj jaroj kaj ekkomencis persekutojn en 1933. Tial miaj gepatroj decidis en 1934 protekti la familion translokiĝante tiom fore de Berlino.

Berlinon mi revizitis en 1975 kiam urbestro de okcidenta parto de la urbo invitis ĉiujn fuĝintajn eksberlinanojn je kosto de la urbo, veni kaj viziti Berlinon kun eventuala celo reveni vivi en ĝi. Familianojn mi ne serĉis sciante ke ĉiuj malaperis inter 1933 kaj 1945.

(sekvo al la paĝo 6...)

Morto de Paul Ronald (sekvo)

Jérôme Frédéric Bouchard

(sekvo de la paĝo 5)

Same mi eĉ ne vizitis la hejman straton kiu ja estis parto de okcidenta Berlino. Berlinon mi ne povas forgesi ĉar de tie venas ĉiujare kalendaro kaj informbulteno kaj tiel mi daŭre scias pri la vivo tie. Mi estas membro de Germana klubo en Montrealo, do kelkfoje mi havas okazon paroli la germanan. Kun mia edzino svisdevena el franca kantono, mi uzas la anglan. La angla estis la lingvo de niaj infanoj en lernejo kaj kvartalo.

Kompreneble en Sud-Afriko mi eklernis la anglan kiu estas oficiala lingvo kaj afikaansan kiu similas al la nederlanda. En Capetown mi finis lernejon. Ĝi estis por blankuloj ĉar ĝi troviĝis en nia kvartalo kie loĝis eŭropdevenaj personoj. Tamen la universitato kiu estis tre liberala rilate rasojn, estis malfermita al ĉiuj. Dum tiuj studentaj jaroj en vesperaj horoj, mi ofte instruis senpage al nigruloj la anglan, matematikon kaj fizikon.

Kiel studento mi eklernis Esperanton en 1944 kun amiko de nia familio : D^{ro} Liebeck. Mi rapide lernis la internacian lingvon ĉar kiel junulo idealista, mi ekapogis tiun ideon pri komuna lingvo. Ofte mi spertis en tiu dulingva medio same kiel mi spertas hodiaŭ en Kanado. Oficiale dulingva ŝtato ja bezonas unu komunan lingvon. Esperanto kaj ĉiuj Zamenhofaj idealoj, ŝajnas al mi plej taŭgaj.

Mi komencis korespondadi kun junulino en Filipinoj kaj kun sidejo de UEA. Mi tuj fariĝis delegito de UEA. Delegita reto estas unika kaj tre valora aranĝo. Ĝi montras eblecon ke ordinara homo povas turni sin al persono de iu ajn lando kaj havi certe respondon. Foje oni skribas aŭ turnas sin al propra konsulejo kie bedaŭrinde personoj ne tiom helpas kiel Esperantisto de koncerna lando, kiu pli scias kaj pli bone konsilas. Delegitan reton mi ekuzis kiam mi translokiĝis kun mia edzino al Montrealo en 1951. Tiam loka delegito D^{ro} Pratley, civila inĝeniero, helpis al mi trovi loĝejon kaj serĉi laboron en kompanio Northern Electric, poste Northern Telecom.

Pensante pri nia alveno en Montrealo, mi bone memoras nian surprizon kiam ni unue vidis « Reĝan Monton » (Mont Royal). Laŭ ĝi la urbo ricevis la nomon. Ĝi ja estis vera ŝerco por ni. Mi jam diris ke mia edzino naskiĝis en Svislando kaj montgrimpis tie, kaj mi en Sud-Afriko, kie troviĝas montoj de 3000 metroj. Do kun ideo kiaj estas montoj, ni atingis Montrealon kie ni interesiĝis pri la fama monto. Ekvidinte ĝin ni devis ridi ĉar ĝi apenaŭ pli altas ol hodiaŭaj nubskrapuloj.

Vivante en Montrealo mi kuraĝigis D^{ron} Pratley restarigi E-klubon. Ĉi tie troviĝis jam aliaj esperantistoj : Jean Forgeau, Red Archell, Paul Durette. Tiam en Toronto vivis plej aktiva

membro de Kanada Esperanto-Asocio Dez Hackett kiun mi same kuraĝigis apogante aktivecojn. Ni sukcesis havi kongreson de KEA en Montrealo en 1959 kiun partoprenis 50 personoj. Mia edzino ankaŭ lernis esperanton. Tiel ŝi povis multe helpi al mi organizante libro-servon. Tio estis inter 1972 kaj 1976 dum mia prezidanteco de KEA. Mia plej aĝa filino lernis Esperanton en lingvo-laboratorio de Duncan Charters kaj Edmund Brent, dum nur unu semajnfino antaŭ la kongreso.

Kiel Esperantisto mi aktivis en la skolta movado. En okcidento de la insulo esperantistoj kiuj loĝas proksime fondis E-klubon nomatan « Esperanto Klubo de okcidenta Montrealo ». Ni ne estas multnombraj sed ni regule renkontiĝas ĉiun trian semajnon en niaj hejmoj por babilado, prelegeto kaj tetrinkado. Pensante pri Esperanto estas por mi neforgeseblaj UK-oj en Portland (Oregon), Kopenhago, Rejkjaviko, Vieno kaj Tampere.

Inter miaj aliaj asociaj okupoj mi menciis la aktivecon por la asocio Amnestio Internacia.

Mi estas kanadano kaj mi provas subteni Kanadon en Kebekio. Kanado estas mia nuna hejmlando samekiel antaŭe estis Sud-Afriko, kaj pli antaŭe Germanio. Transmigrante mi lernis ke la hejmlando povas esti tiu kiun oni elektas kaj ke neniu lando havas monopolon pri beleco aŭ kulturo.

La franca kaj angla lingvoj en Kebekio

Sylvain Auclair

Noto: la enhavo de tiu artikolo estas sub la plena respondeco de la aŭtoro. Esperanto-Societo Kebekia neniel aprobis ĝin. Lingvaj demandoj en Kebekio estas politike tiklaj, eĉ por Esperantistoj.

Ĉar plej multaj Kebekianoj (ankoraŭ) ne scipovas Esperanton, povas esti ke partoprenantoj en la 7^a TAKE provos paroli alian lingvon kun surstratulo. Jen mi avertas vin pri la eblaj sekvoj de tia provo kaj pri la kialoj de tiuj sekvoj.

Se vi scipovas la francan kaj scias pri la lingva situacio en Kebekio, vi verŝajne emos uzi tiun lingvon. Ĉi tie estas du ebloj: se vi parolas kiel oni parolas en Francio, povas esti ke oni ja ĝentile respondos al vi, sed ke vi tute ne komprenos la respondon. Pri tio legu mian alian artikolon.

Alia eblo: oni respondos al vi en la angla. Nu, povas esti ke vi parolas kun alia, kanada aŭ usona, turisto. Aŭ kun maljuna anglalingva Kebekiano, kiu, kvankam li aŭ ŝi pasigis sian tutan vivon en Montrealo, neniam lernis la francan. Sed ja tio povas okazi fare de franclingva Kebekiano. En tiu ĉi kazo, ne tro zorgu: vi verŝajne tre bone parolis sed tamen havas fremdam akĉenton, per kiu oni rekonis vin kiel fremdulon, kaj de jarcentoj oni trejnigis nin pri tio, ke ĉiuj fremduloj parolas angle (jes

ja: enmigrintoj de preskaŭ ĉiuj landoj rapide akiris la anglan kiel ensociiĝan lingvon, almenaŭ ĝis la 80-aj jaroj – ili ja venis al Kanado, kiu estas anglalingva lando, ĉu ne?) kaj ke estas malĝentile – kaj senutile – trudi al ili nian provincan lingvon.

En tiu kazo, vi ja povas postuli respondon en la franca, sed mi ne vetus je sukceso.

Kaj iuj poste plendos, ke enmigrintoj ne lernas la francan...

Eble vi povas provi la anglan, vi diras. Prave, preskaŭ ĉiuj plezure klopodos respondi al vi, kaj plej multaj eĉ sukcesos. Sed vi ja povas renkonti iujn, kiuj rifuzos paroli angle kun vi. Tiuj kredas ke vi estas enmigrinto kiu rifuzas lingve ensociiĝi, aŭ kanada turisto, kiu klopodas pluigi la lingvon invadon. Tiuj aŭ rifuzos paroli kun vi, aŭ parolos france. Pri via ebla kompreno de franca respondo, legu supre.

Aŭ provu la hispanan (pri la portugala, mi havas pli multan dubon, ke vi sukcesos – kaj tiam, sciu, ke plej multaj portugallingvanoj en Montrealo venas de Acoraj insuloj...). Eble oni komprenos vin kaj vi povos babilu hispane, aŭ oni respondos angle, ĉar ĉiuj fremduloj nepre scipovas la anglan, ĉu ne mi jam diris tion?

Eble epokfara lingva festivalo en Ĉinio!

Dennis Edward Keefe

Mi ankoraŭ ne komplete analizis niajn statistikojn sed estas tutklare, ke estas la plej granda Lingva Festivalo (el pli ol 50) en la historio. Multege da ĉinoj vizitis la esperantajn provlecionojn. Estis granda amaso de junuloj en la esperantaj kursetoj. Ekestiĝis multe da ĵurnalaj artikoloj, radiaj elsendoj, kaj almenaŭ kvar televidprogramoj, vidataj de mi ne scias kiom da milionoj da personoj, kun favora raporto pri Esperanto. La vorto Esperanto aperis multfoje en la amaskomunikiloj - dekojn da fojoj. Multe da Ĉinoj aliĝis al postaj kursetoj de Esperanto - multe el ili nuntempaj instruistoj aŭ doktoriĝintaj studentoj ĉe la prestiĝa Universitato de Nankino.

Ĉinoj speciale venis al Nanjing el foraj urboj inkluzive Ŝanhajo kaj Pekino (9-hora distanco de Nanjingo) por speciale viziti la Lingvan Festivalon). Oni aŭdas, ke eble nun la urbo de Nanjing volas subteni la Festivalon. Estas personoj, kiuj ne nur ĉeestis esperantajn provlecionojn, ili eĉ esprimis sian deziron lerni Esperanton kaj instrui ĝin poste!

Mi devas kuri ĉar atendas nin hodiaŭ personoj kiuj volas eklerni Esperanton (Sinjorino Cui - kiu estras 100 profesorojn kaj instruistojn ĉe la Universitato de Nanjing rapide starigis pro la rezultoj de la Lingva Festivalo specialajn kursojn de Esperanto!).

Lingvoj gravas!

Koïchiro Matsuura, Ĝenerala Direktoro de Unesko

La jaro 2008 estas proklamita Internacia Jaro de Lingvoj fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. Unesko, al kiu oni konfidis la taskon kunordigi la agadon por la Jaro, pretas plenumi sian rolon kiel gvida aganto.

La Organizaĵo estas plene konscia pri la decida graveco de la lingvoj por la multaj defioj, kiujn la homaro devos alfronti dum la venontaj jardekoj.

La lingvoj fakte estas nepraj por la identeco de la homaj grupoj kaj individuoj kaj por ilia paca kunekzisto. Ili estas strategia faktoro por antaŭeniri al daŭropova evoluigo kaj harmonia rilato inter la tutmonda kaj la loka.

La lingvoj havas kernan gravecon por atingi la ses celojn de Edukado por Ĉiuj (EPC) kaj la Jarmilajn Evoluigajn Celojn (JEC) aprobitajn de Unuiĝintaj Nacioj en 2000.

Kiel faktoro de socia integriĝo, la lingvoj ludas strategian rolon en la forigo de la ekstrema malriĉeco kaj malsato (JEC 1), dum kiel kolonoj de alfabetiĝo kaj lernado de kapabloj por la vivo ili estas ankaŭ nepraj por atingi universalan unuanivelan edukadon (JEC 2). La batalo kontraŭ HIV/aidoso, malario

kaj aliaj malsanoj (JEC 6) devas utiligi la lingvojn de la koncernaj homgrupoj por trafi ilin, kaj la konservado de lokaj kaj indiĝenaj scioj kaj lertoj strebe al naturmedia plutenblo (JEC 7) estas kerne ligita al lokaj kaj indiĝenaj lingvoj.

Plie, la kultura diverseco estas intime ligita al la lingva diverseco, kiel indikite en la Universala Deklaracio pri Kultura Diverseco de Unesko kaj ĝia Agoplano (2001), la Konvencio por la Konservado de la Nemateria Kultura Heredaĵo kaj la Konvencio pri la Protektado kaj Antaŭenigo de la Diverseco de la Kulturaj Esprimoj (2005).

Tamen, en la daŭro de kelkaj generacioj, pli ol 50% el la 7000 lingvoj parolataj en la mondo povos malaperi. Nun estas uzata malpli ol kvarono el ili en la lernejoj kaj ciberspaco, kaj la plimulton oni uzas nur sporade. Miloj da lingvoj -- malgraŭ tio ke ĉiu estas regata de homgrupo kiu ĝin uzas kiel ĉiutagan komunikilon -- forestas el la eduksistemoj, komunikaj rimedoj, eldona industrio kaj ĝenerale el la publika sfero.

Urĝas agi. Kiel? Per la kuraĝigo kaj prilaboro de lingvopolitikoj ebligantaj al ĉiu lingvokomunumo la uzon

de ties gepatra lingvo kiel eble plej vaste kaj ofte, ankaŭ en la edukado, apud la rego de iu nacia aŭ regiona lingvo kaj iu internacia lingvo. Ankaŭ kuraĝigante la parolantojn de regantaj lingvoj regi alian nacian aŭ regionan lingvon kaj unu aŭ du internaciajn lingvojn. Nur se plurlingvismo estos plene akceptita, ĉiuj lingvoj povos trovi sian lokon en nia tutmondiĝinta mondo.

Tial Unesko invitas la registarojn, UN-organojn, organizaĵojn de la civila socio, edukajn instituciojn, asociojn de profesiuloj kaj ĉiujn aliajn koncernatojn stimuli la respekton, antaŭenigon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj, aparte de tiuj endanĝerigitaj, en ĉiuj situacioj de la individua kaj kolektiva vivoj.

Ĉu per iniciatoj sur la eduka kampo, la ciberspaco aŭ la klera medio; ĉu per projektoj por savtenado de endanĝerigitaj lingvoj aŭ antaŭenigo de la lingvoj kiel iloj de socia integriĝo; aŭ per esplorado de la interrilato inter la lingvoj kaj la ekonomio, inter la lingvoj kaj scioj de la indiĝenoj aŭ inter la lingvoj kaj la kreado, estas necese ke la ideo «lingvoj gravas!» estu diskonigata ĉie.

(sekvo al la paĝo 9...)

Reago al projekto DialogAm

Lingvoj gravas! (sekvo)

Bruce Arthur

La Marta numero de La Riverego enhavis artikolo de Mario Périard pri « interkomprenado » kaj la projekto *DialogAm*. Tio interesis min, ĉar mi ne sciis pri tio antaŭe. Tamen mi ne apogas la ideon, ĉar mi pensas, ke ĝi estas tute ne praktika.

Laŭ la propono de *DialogAm*, oni uzu lingvo-instruadon por ke ĉiuj en Ameriko povu komuniki inter si. Kutime, kiam oni studas lingvon, oni celas uzi la lingvon — paroli, kompreni, skribi kaj legi. Sed laŭ la propono de *DialogAm*, oni nur celus lerni kompreni la lingvon, ne paroli aŭ skribi ĝin. Tiel, la lernado estus iom pli facila, kio estas avantaĝo de ĉi tiu ideo. Post kiam ĉiuj lernos same, homoj de malsamaj lingvoj povus komuniki inter si — ĉiuj parolus sian gepatran lingvon, sed ili povus kompreni unu la alian. Ĝi estas idealisma projekto, sed mi pensas, ke ĝi estas bedaŭrine tre malpraktika.

La ideo eble estus praktika, se estus nur du lingvoj. Sed en Ameriko estas kvar gravaj lingvoj, do ĉiuj devus lerni kompreni tri novajn lingvojn. Mi pensas, ke estus tro malfacile.

Kaj la artikolo diras, ke estas Amerikanoj kies gepatra lingvo ne estas unu el la kvar gravaj lingvoj. Ĝi proponas, ke ĉi tiuj homoj lernu paroli Esperanton (kaj lerni kompreni la kvar aliajn lingvojn). Do por komuniki kun ĉi tiuj homoj, ĉiuj aliaj devus lerni kiel kompreni Esperanton (krom la aliaj tri lingvoj, kiujn ili studas).

Al mi la tuta ideo estas malpraktika — kun Esperanto aŭ sen ĝi. Estas multe pli bone lerni nur unu lingvon por internacia komunikado. Kaj estus plej bone se ĉi tiu lingvo estus lingvo facila kaj neŭtrala, tio estas Esperanto. (Teorie oni povus krei novan lingvon facilan kaj neŭtralan, sed kial re-inventi ion, kio jam ekzistas?)

Al mi, klaras ke uzi Esperanton kiel internacian lingvon estas la plej praktika metodo por atingi « interkomprenadon ». Estas tio, kion mi apogas.

Koïchiro Matsuura

(sekvo de la paĝo 8)

Tiukuntekste, la 21^a de februaro kiel dato de la naŭa Internacia Tago de la Gepatra Lingvo havos elstaran signifon kaj estos aparte taŭga limdato por la enkonduko de iniciatoj celantaj antaŭenigon de lingvoj.

Nia komuna celo estas atingi agnoskon, sur la nacia, regiona kaj internacia niveloj, pri la graveco de la lingva diverseco kaj plurlingvismo en la eduka, administra kaj jura sistemoj, en la kulturaj esprimoj kaj komunikaj iloj, en la ciberspaco kaj komerco.

La Internacia Jaro de Lingvoj 2008 alportos unikan ŝancon por fari decidan antaŭeniron survoje al la atingo de tiuj celoj.

Montrealaj Esperanto-kunvenoj (MEK)

DATO	KIE	HORO	TEMO
7 - 11 jul. 2008	Kebekio		Antaŭ-kongreso
12 - 18 jul. 2008	Montrealo		Tut-Amerika Kongreso de Esperanto
19 - 20 jul. 2008	Kebeko		Post-kongreso
26 sep. 2008	MEDO **	19 h	Generala kunsido de ESK
11 - 13 okt. 2008	Silver Bay		Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto

** **Montreala Esperanto-Domo (MEDO):** 6358-A rue de Bordeaux, Montréal

Entre Papineau et De Lorimier.

Métro Beaubien, Autobus 18 Beaubien Est

Voir le site web pour un plan d'accès : www.esperanto.qc.ca

19 h *Horo por komencantoj, lernado, konversacio, demandoj pri la movado.*

Heure pour les débutants : conversation, questions, grammaire...

20 h *Anoncoj, libera babilado, libro - pruntado kaj - aĉetado, aliĝo al ESK.*

Annonces, emprunt ou achat de livres, de revues, adhésion à la SQE.

20 h 30 *Tema programo, diskuto, kvizo, ludo...*

Programme thématique, discussion, quizz, jeux...

Por komentoj, proponoj, demandoj : informo@esperanto.qc.ca

Kaj?

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto et un regroupement de club espérantistes. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego@esperanto.qc.ca...

Club d'espéranto de l'UdeM: udem@esperanto.qc.ca

Club d'espéranto de l'UQAM: uqam@esperanto.qc.ca

McGill Esperanto Club: mcgill@esperanto.qc.ca

MEMO, Montreala Esperanto-Movado : www.esperanto-montreal.org